# La monda rekordisto Javier Sotomayor ricevas latinan premion de svisa horlo?-firmao




**Jvier Sotomayor  ricevas premion  Latino Award 2020 Cuervo y Sobrinos**

La kubano Javier Sotomayor, la plej bona altec-saltisto de la historio, ricevis en Havano la latinan premion 2020 de la presti?a horlo?-domo svisa “Korvo kaj Nevoj”, rekone al lia eksterordinara trajektorio sporta.

Sotomayor, posedanto de la ankora? mondaj rekordoj je alteca salto dankis la premion per mesa?o en la sociaj retejoj, akompanata de foto en kiu li portas la ekskluzivan juvelon de la svisa marko, fondita en Havano en 1882.

Sotomayor dankis pro tiu ?i rekono al sia sporta kariero, “ne jarcenta kiel la presti?a juvelo, sed plurjardeka kiel monda  rekordisto”.

La premia ceremonio okazis en la Palaco de la Vickaporalo en la malnova urbocentro, kiun partoprenis  tri el liaj 5 filoj kaj la olimpia ?ampiono Anier García.

Ekde 2003 la firmao “Korvo kaj Nevoj” transdonis la Premion Latinan por oma?i elstarulojn latinajn en profesiaj medioj, inter ili, al  la muzikisto Chucho Valdés, la dancisto Carlos Acosta, la historiisto Eusebio Leal, kaj aliaj artistoj internaciaj  kiel Pedro Almodóvar, Miguel Bosé, Andy García kaj Antonio Banderas.

La firmao havas ekde 2009 sian vendejon Boutique en la historia centro de Havano.

La ceremonion ?eestis membroj de la svisa kaj hispana ambasado en Havano, elstaruloj de la ?efa domo de la svisa kompanio kaj de la oficejo de la historiisto de Havano.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/deportes/244605-la-monda-rekordisto-javier-sotomayor-ricevas-latinan-premion-de-svisa-horlog-firmao

Radio Habana Cuba